8-a JARO, N-o 376/377



LEIPZIG, 17. / 12. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

KIAL PAROLAS LA HOMOJ?

Paŭlo Demény.

Nelonge post kiam la prahomoj siajn bestajn kutimojn forlasis, evoluis en ili la kapablo, por esprimi siajn pensojn per silabigitaj vortgrupoj al la aliaj homoj. La parolo ne fariĝis kune kun la homoj, nek estis la invento de iu hazardo, sed estis la rezulto de tiu granda batalo, kiun la homoj faras kontraŭ la naturo. Ankaŭ la bestoj batalas kontraŭ la natur-fortoj, sed aliel. Ili aliformigas sin, aplikiĝas al la naturo k per tio plifaciligas siajn vivojn, sed la homo transformas la naturon. Ĝuste tiu transforma laboro necesigis al la homoj la parolon. Dum la bestoj kapablas nur kelkajn sentojn esprimi per kelkaj senformaj krioj, kiuj koncernas la malsaton, doloron k la seksajn instinktojn, la homoj bezonis signi per la sama songrupo, en sia transforma laboro, la periode ripetiĝantajn laborojn, la konstante uzatajn ilojn k materialojn. Tio estis bezonata pro tio, ke la laboro estas socia k la rimarkojn k spertojn al la aliaj homoj ili devis sciigi. Tion ili povis fari nur tiel, se la laborilojn k la laborfluon ili signis per konstanta nomo. Kompreneble tiuj nomoj estis komence senformaj vortgrupoj, kiel nuntempe ankaŭ oni uzas, kiam pezajn objektojn oni pluigas: „ho-ruk". Sed la komence senformaj k individuaj nomoj per la ripetado k per la aplikiĝo al la laborfluo nun jam fariĝis silabaj esprimoj uzataj ĉe unu malgranda homgrupo. La tiel evoluinta „lingvo" servis por helpi la socian produktadon, la laboron de la homoj, plifaciligi la vivon de la homoj k per tio fariĝi gravega forto de la socia evoluo.

Sed la homa lingvo, simile al ekonomio, politiko k la ideologio de la socio, ĉe iu grado de sia evoluo kontraŭas la evoluon de la socio k anstataŭ helpi, malhelpas ĝin. La homa parolo, kiu en sia evoluo transformis la vivon de la socio k per tio ĝi estas revolucia, hodiaŭ en la lastaj tempoj de la klas-socio, en la imperiista kapitalismo, fariĝas ilo de la reakcio.

AL ZAMENHOF

EMBA

Zamenhof, Majstro, hom' genia,
Idealisto time pia,
Aŭtor' de lingvo portutmonda,
Vin kovras jam la humo tomba.

Substanco larĝe dissŝutita,
En via krea man' granita
Ricevis vivon, bazon, kernon,
Animon, tuton, viveternon.

Konkuris vi eĉ kun la dioj,
Sed kaŭzon de mond-tragedioj,
Esencon de batalo nia
Jam nekonceptis cerbo via.

Sed tamen je la datreveno
De via naskotag-mateno,
Ĉe via tomboŝton-figuro
Mi staras en la man' kun laŭro.

Al laŭr' mi ligis ruĝrubandon
Kaj sur la ruĝrubandan randon,
Dum vent' pri dorm' eterna kantas,
Mi vortojn jenajn skribe plantas:

„Vivplene staras via verko,
Samkiel forta bela kverko
Post ŝtormo de la elementoj
Venkinta kontraŭ rabaj ventoj.

Kaj dum la mond' de l'burĝa pompo
Per via verk' nur sin amuzas,
Por noblaj celoj ĝin sen trompo
Nur ni, proletoj, vere uzas."

Eble multaj demandos, kiel tio estas ebla, ke la lingvo estas reakcia? Sed ni definitive povas respondi, ke tiu ĉi mia aserto ne estas troigo, ĉar estas sufiĉe, se mi mencias, ke la ĉirkaŭbaritaj lingvoregionoj fortigas la naciismon. La kapitalisma varproduktado ĉirkaŭas la tutan mondon, gigantaj monopol-entreprenoj internacie ekspluatas la proletaron k bombojn ĵetantaj aeroplanoj flugadas de unu kontinento al la alia kiel muŝoj de la kulero al la taso. Sed en tia epoko de la internaciismo malgraŭe ankoraŭ estas eble, ke kelkaj centmiloj, eĉ milionoj da homoj vivas izolite, nekomprenante unu la alian.

Tiu ĉi lingva malkompreno multe helpos al la imperiistoj-sinjoroj de la mondo, ĉar ili povas per tio dividi la proletojn, kvankam ili ĉiuj havas la saman intereson. Eĉ la lingvaj diferencoj ebligas ankaŭ tion, ke en la sama lando vivantajn proletojn, parolantajn malsamajn lingvojn, oni povu intermalpacigi. Sufiĉas aludi al la regado de la angloj en Hindio, kie la indiĝenoj parolas 33 lingvojn, tamen nekomprenante unu la alian, k per tio multe helpas la daŭron de la nomita regado. Sed multe pli proksime ni trovas ekzemplon. Mi aludas al la laŭ lingvoteritorioj disiĝanta laborista movado en Ĉeĥoslovakio aŭ al la naciisttendencaj kontrastoj en la malnova aŭstro-hungara ŝtato. Pro tio ni senrezone povas diri, ke la lingvo povas stari en la servo de la reakcio.

Nun oni povas demandi, ĉu ne estus eble la lingvon konforme al ĝia natura destino refoje starigi en la servon de la progreso, aŭ apliki ĝin en la grandioza batalo de la proletaro kiel ilon? Ni eĉ povas jam respondi: *Ne nur estas eble, sed estas necese* igi la lingvon armilo en la liberiga batalo de la proletaro. Kaj ĝuste en tiu ĉi okazo okulfrape evidentiĝas al ni la grava signifo de esperanto, kiun ĉiuj proletoj, kian ajn lingvon ili parolas, povas facile ellerni. Sekve ĝi forviŝas la landlimojn k atingas la plej kaŝitajn vilaĝojn. La internacia lingvo neniigas la naciismajn izolitecojn k ebligas la progreson de la proletaro, kiu estas

premita en la abismon de la nescio. Sekve antaŭ ni ĉiam pli k pli klariĝas la signifo de esperanto en internacia rilato.

Nature ellernado k propagando de esperanto plej unue devas esti la tasko de l'socialistoj. Ili la homan lingvon povas starigi refoje en la servon de la progreso, pere de esperanto.


La evoluo de la socio iras tra la socialismo k la socialismon efektivigos la klasbatalo de la proletoj. Sukcesante akiri novan armilon por tiu ĉi batalo, ni antaŭhelpas la definitivan triumfon de la socialismo.

La tasko de la homa lingvo povas esti nur la plej baldaŭa venko de la socialismo k por helpi al tio ni parolas esperante.

Kiel senlaboruloj vivas en Aŭstrio.

Ĉar mi mem nun estas senlabora, mi povas priskribi la vivon de aŭstriaj senlaboruloj laŭ personaj spertoj.

Se laboristo (aŭ oficisto) fariĝas senlabora, li (aŭ ŝi) ricevas dum kelka tempo monsubtenon (kondiĉe ke li – aŭ ŝi – estis laborinta almenaŭ 20



Parto de komunuma loĝdomego en Vieno.

semajnojn), kiu sumiĝas je 17 ŝil. posemajne por negeedziĝintoj k ĉ. 20 – 25 ŝil. semajne por geedziĝintoj (depende de la nombro da infanoj). Tiu monsubteno funkcias en formo de asekuro, t. e. laboristoj k entreprenistoj pagas kotizojn, dum la ŝtato kovras la deficiton. La monsubteno estas donata unue por tri monatoj, poste ĝi estas plilongigata k fine transformata en t. n. „mizerstatan" subtenon, kiun devas partopreni ankaŭ la komunumoj. Entute la monhelpo povas daŭri eĉ kelkajn jarojn, sed ĝi laŭ la daŭro estas *malpligrandigata*. Kompreneble oni kontrolas la senlaborulon, ĉu li fakte bezonas la monsubtenon, ĉu li ne kaŝe perlaboras ion, aŭ ĉu li ne havas parencojn, kiuj povus permone helpi al li. La praktikado de la senlaborula asekuro kelkokaze ja montras ĉikanojn, ĉar la nombro da senlaboruloj konstante kreskas, dum la nombro da laborantoj (kiuj kontribuas al la asekuro) malkreskas. Inversa proporcio!

Oficistoj estas en pli favora stato, ĉar por ili ekzistas leĝa maldungdaŭro, nome

6 semajnoj, se la oficisto laboris ĝis 2 jaroj;
2 monatoj, se la oficisto laboris de 2 – 5 j.
3 monatoj, se la oficisto laboris de 5 – 15 j.
4 monatoj, se la oficisto laboris de 15 – 25 j.
5 monatoj, se la oficisto laboris pli ol 25 j.

La maldungo povas okazi nur fine de l'jarkvarono. Dum la maldungdaŭro la oficistoj ankoraŭ devas deĵori. La oficisto rajtas ĉesigi la kontrakton fine de ĉiu monato.

Krome la maldungitaj oficistoj ricevas sumon, por kiu ili ne plu bezonas labori, nome:

plenan salajron por 2 monatoj, se la kontrakto daŭris 3 – 5 jarojn;
plenan salajron por 3 monatoj, se la kontrakto daŭris 5 – 10 jarojn;
plenan salajron por 4 monatoj, se la kontrakto daŭris 10 – 15 jarojn;
plenan salajron por 6 monatoj, se la kontrakto daŭris 15 – 20 jarojn;
plenan salajron por 9 monatoj, se la kontrakto daŭris 20 – 25 jarojn;
plenan salajron por 12 monatoj, se la kontrakto daŭris pli ol 25 jarojn.

Do la maldungo por la oficisto ne signifas *tujan* mizeriĝon kiel por la laboristo. La senlaborula asekuro estas la sama por oficistoj k laboristoj, sed burĝaj deputitoj foje proponis en la parlamento, ke oni disigu ambaŭ asekurojn, ĉar la deficito ĉe la laborista flanko estas pli granda (laŭproporcie) ol ĉe la oficista. Tiuj sinjoroj eĉ ne havas la plej malgrandan senton de solidaro!

Ĉu mi celis esprimi kontenton pri la situacio de senlaboruloj en Aŭstrio? Tute ne! Eĉ la plej ampleksa sistemo por subteni senlaborulojn ne povas anstataŭi la monakiron pere de laboro. Tamen mi konstatu, ke la senlaborulo en Aŭstrio dum kelka tempo estas ŝirmata almenaŭ kontraŭ la plej kruda mizero. (Por komparo kun la komence cititaj sumoj mi diru, ke laboristoj nuntempe perlaboras ĉ. 40 – 50 ŝil. posemajne, oficistoj ĉ. 200 – 300 ŝil. pomonate. Do la monsubteno por senlaboraj laboristoj sumiĝas je preskaŭ duono de laborista salajro, ne konsiderante la fakton, ke multaj laboristoj laboras nur 4 aŭ 3 tagojn posemajne).

La senlaborula asekuro en Aŭstrio estas objekto de plej akra atakemo de l'enlanda burĝaro k de l'envio de alilandaj laboristoj. En neniu lando ĉirkaŭ ni ekzistas tiom vasta senlaborula asekuro kiel en Aŭstrio. En Hungario (najbara lando de ni) la senlaboruloj ricevas tute nenion! Kaj en Aŭstrio mem nur la forto de la socialdemokrata partio garantias rifuzon de l' atakoj de la kapitalisma burĝaro.

F. S.

PRI LA BREĈO.

Kelkaj K-doj ankoraŭ havas la opinion, ke CK de SEU ne planis friponi grandan sumon al SAT por tiel ĝin bankrotigi, sed ke nur la malpermeso sendi monon eksterlanden malhelpis.

Al tiuj kredemuloj ni ripetas, ke CK de SEU havis la eblon pagi sian ŝuldon en rubloj ĉe la filio de „Neudrag" – nia tiutempa presejo – en Moskvo mem. Ne povas do esti dubo por ĉiu klarvida homo, ke la rabo estis de longe planita k tute malvarmsange efektivigita.

La raba atenco ne atingis sian celon: SAT pluvivas, sed estas evidente, ke la breĉo farita en ĝia buĝeto ne estas ankoraŭ ŝtopita. Daŭrigu do, Gek-doj, kolekti mondonacojn, cirkuligi kolektlistojn; ne laciĝu en tiu klopodado, ĝis nia Asocio estos retrovinta sian buĝetan ekvilibron.

Por ŝtopi la breĉon

6. listo

1045	Mehlhorn (Leipzig)	mk.g.	1.20
17054	O. Spetz (Finspang)	mk.g.	3.98
17040	W. Varley (York)	mk.g.	2.–
13553	Pahlke (Berlin)	mk.g.	2.–
9534	Michalski (Berlin)	mk.g.	3.–
Likvidiĝinta Esp. Rondo (Penzig)		mk.g.	9.65
	J. M. D. (Ellowz)	mk.g.	2.90
	Sekcio Amsterdam. V.	guld.	9.25
	Sekcio Amsterdam. X.	guld.	4.45
Alois Gross (Morschwiller)		fr. fr.	10.–
Labor. Esp. Grupo Bruselo		fr. fr.	70,90
	H. B. (Annecy)	fr. fr.	10.–
12643	K-dino Deniau (Mer)	fr. fr.	10.–

Iom da statistiko pri laborista kleriga agado en Svedio.

Kiel oni jam scias, la skandinavia laborista kleriga agado estas unu el la plej modelaj en la tuta mondo. En ĉi suba artikoleto estu donitaj kelkaj nombroj pri la agado de ABF (Sveda Laborista Kleriga Asocio) dum la pasinta studsezono (1930/31).

Sume ABF havas preskaŭ 1,5 milionon da membroj (pli precize 1434674); sekve unu kvinono (20 %) el la tuta sveda popolo apartenas al ABF. Dum la pasinta studsezono ABF kreskis je 128 940 membroj. La asocio havas organizojn en pli ol 1000 svedaj urboj, urbetoj k vilaĝoj. Da bibliotekoj ĝi havas 1063 kun 322 860 volumoj. Dum la jaro uzis bibliotekojn 71 075 personoj, kiuj legis 609 961 librojn.

3430 Studrondoj estis aranĝitaj kun 47 774 partoprenantoj (en la antaŭa studsezono – 3 051 studr. kun 41 752 p.). Kiel oni povas vidi, la studagado kreskis. Plej lernemaj k aranĝemaj estis la kluboj de Sveda Socialdemokrata Junulara Asocio, kiuj per ABF

arangîs preskaŭ 1000 (nome 986) studrondojn; sekvas fakorganizoj (landorganizoj estas la laŭvorta traduko) kun 593 studr., Socialdemokrata Lab. Partio kun 227, Laborista Abstinenca Asocio NOV kun 105, Kooperativa Federacio kun 89 k. a.

Plej ŝatata studmaterialo estis organizaj demandoj, pri kiuj okupis sin 508 studrondoj; sekvas ŝtat- k komunumscienco — 352, angla lingvo — 303, esperanto — 299, sveda lingvo — 247, matematiko — 215, beletristiko — 205, fakorganiza movado — 185, librotenado — 176, kantado k muziko — 168, socialismo — 107, germana lingvo — 89, komunismo — 83, oratora kapablo — 83, nacia ekonomio — 75.

Oni povas rimarki, ke por angla lingvo oni havis 4 studrondojn pli ol por esp-o. Tio absolute ne signifas, ke efektive anglan lingvon lernis pli multaj personoj, ĉar anglaj studrondoj havas por rondo po 10—15 partoprenantoj, dum en esp. studrondoj k kursoj la nombro da partoprenantoj ofte atingis 70. Do ni povas rimarki, ke esp-on oni lernis — trioble pli multe ol anglan lingvon.

326 pli mallongajn kursojn (kelktagajn) k lekciojn oni arangîs kun 2080 lekcioj k 439 studhoroj. Ankaŭ kiel lekcia temo estis plej multe uzata ŝtatk komunumscienco: al ĝi estis dediĉataj 432 lekcioj; al socialismo — 301, fakaj demandoj — 283, nacia ekonomio k kooperativaj demandoj — 239, historio — 227, naturscienco — 175, literaturo — 164 lekcioj.

Kompilis N. Ruus (15 428).

Alvoko al la SAT-anoj!

En Britio nuntempe okazas granda propagando kontraŭ aliaj landoj. Ĉiu granda ĵurnalo, inter ili la „Ĉiutaga Heroldo“ (Daily Herald), la laborpartia organo, ĉiutage kriaĉas „Aĉetu en Britio faritajn varojn!“ „Ne permesu al fremduloj eniri la landon!“ ktp. La efiko estas, ke la laboristaro ekpensas, ke la fremduloj respondecas pri la mizera stato, en kiu troviĝas la brita laboristaro.

Necesas pruvi al la britaj laboristoj, ke ne la alilandanoj respondecas, sed la mondkapitalismo, k ke la laboristaro en ĉiu parto de la mondo, krom Sovetio, suferas la samon. Ni povas tion fari per la traduko de leteroj ricevotaj de gelaboristoj el ĉiuj landoj. Post traduko ni publikigos ilin en metiistaj ĵurnaloj (da kiuj multaj troviĝas en Britio).

Skribu do multnombre pri via metio, kiom da salajro vi ricevas, kiom vi povas aĉeti per ĝi! Kiom kostas pano, butero, ovoj, terpomoj? Kiom estas la luprezo por dometo aŭ ĉambro ktp.? Ni sendos ekzempleron de la enpresinta ĵurnalo al ĉiu, kiu sendos publikigotan leteron.

Gek-doj, helpu nin kontraŭbatali tiun ŝovinistan propagandon k skribu al

Joel Sulski, 19, Leyton Rd.,
Harpenden, *Herts., Britio.*

Ies Opinio.

Tributo al homo.

Ĉiufoje kiam Lindberg fendas la ĉielon per nova akrobataĵo, mi pensas ne pri la juna aglo alten fluganta, sed pri lia patro, kiu flugis kun alta kuraĝo k nenia sento pri la konsekvencoj en la plej supraj atingaĵoj de sendependa pensado. Ne multe estas aŭdata pri la pli maljuna Lindberg en la nunaj tagoj. Tio estas ĉagrena, ĉar kian monumenton Karlo en sia monda makul-lumo povus starigi al sia batalanta patro!

Ne ekzistas multaj libroj, kiuj ne troviĝas en la Parlamenta librejo, sed vi ne trovos „Kial ni estas en milito“ (Why We Are at War) de l'parlamentano Lindberg en Vaŝingtono, nek aliloke, tiom kiom mi scias. Se iu leganto scias, kie troviĝas ekzemplero de ĉi tiu verko, mi povas amasigi konsiderindan sumon por aĉeti aŭ prunteprenі ĝin. Vere, se vi volas diri al mi, kie mi povas ŝteli ekzempleron, ĉu la afero ne povas esti arangâta. En la afero pri liberalismo mi ne posedas moralajn skrupulojn — neniajn ajn.

„Kial ni estas en milito“ estis eldonita de l'parlamentano Lindberg, dum ni estis trenataj en la transmaran ĥaoson, k li eldiris sian tutan penson pri ĝi. Se li ne havus konsiderindan influon, li estus aliĝinta al Debs en Atlanto, k tiom intensa estis la pseŭda patriotisma sento kontraŭ li, ke lia filo devis flugigi lin super la popolamason k surterigi lin sekrete sur kampo, por ke li povu fari paroladon al sia elektantaro. Mi rigardas tion kiel la plej grandan flugheroaĵon de Karlo Lindberg, k pli indan je medaloj ol tiuj pli malsuperaj flugoj, por kiuj registaroj k G.O.P.-aj[1] prezidantoj tiom gaje pinglas sur lian bruston hodiaŭ honoraĵojn.

Neniu alia homo en oficiala posteno kuraĝis fari tion, kion faris parlamentano Lindberg dum tiuj unuaj tagoj de ĉi tiu nacia *marfobio*[2]. Estis eĉ pli granda afero ol Debs faris, kvankam Debs estus farinta same se li estus Lindberg. Ne ankaŭ estas la plej eta diferenco en tio, ĉu Lindberg la pli aĝa estis prava aŭ ĉu prezidanto Ŭilzn (Wilson) estis prava. Iu ajn homo, kiu estas preta batali por siaj konvinkoj kontraŭ 120 milionoj da furiozaj maniuloj, havas mian entuziasmon k ĉiaman lojalon, k vidante, ke estas nur unu aŭ du en generacio en iu difinita nacio, mia entuziasmo ne fariĝas tro ŝarĝata per kromlaboro.

Sinjoroj, al parlamentano Lindberg — HOMO!

IU (Dana Slit) en „The Los Angeles Record“. *Esp-igis 16 285.*

[1] G.O.P. = Grand old party = granda malnova partio = Usona respublikana partio.

[2] La vorto „Marphobia“ uzita de la aŭtoro ne estas trovebla en eĉ grandaj vortaroj ĉi tie. Mi opinias, ke ĝi estas kunmetaĵo el „Mar“ k „phobia“. La unua i. a. signifas „difekti“, la dua i. a. signifas „nesana malŝato“. Sekve „Marphobia“ estas nomo inventita de Dana Slit (Sleeth) por tia ŝovinismo, kia tiam furiozis en Usono, k kies brava kontraŭstaranto estis parlamentano Lindberg. — *16285.*

EFIKE vi helpas al SAT pagante senprokraste vian kotizon por la jaro 1932!
Nun estas la taŭga momento por varbi novajn anojn, por ke estu garantiita la apero de ilia nomo k adreso en la nova JARLIBRO.

La klasbatalo tra la mondo

La konflikto ĉe la germanaj fervojoj.

La nuligo de la salajrkontrakto fare de la fervoja direkcio cele al malaltigo de la salajroj kaŭzis grandan ekscitonn inter la fervojistaro, kiu akceptis preskaŭ la formon de malferma batalo. Okazis kunvenoj de la fervojistoj en la tuta lando, kie oni akre protestis kontraŭ la direkciaj intencoj. Ĉiuj intertraktoj de la sindikato kun la direkcio malsukcesis pro la necedemo de ĉi lasta. Sed la neatendita kontraŭstaro de l' fervojistaro devigis la direkcion al cedo. Estis alvokita arbitracianto, kiu juĝis, ke la ĝisnuna kontrakto restas neŝanĝita k ke la traktado pri la konflikto estos daŭrigata. La sindikato konsentis pri tiu provizora solvo. Sed la batalhalto ne longe daŭris. Ĉe novaj intertraktoj (10. novembro) la direkcio persistis je siaj postuloj; la 11-an okazis nova arbitracia juĝo, kun rezulto, ke la fundamentaj horsalajroj malaltiĝas depost la 8. nov. je $4^1/_2$ %, k tiu ĉi reguligo estos nuligebla unuafoje la 31. marto 1932. La sindikatoj decidis malakcepti tiun ĉi juĝon, kiun cetere kontraŭstaros verŝajne la trafita personaro.

La pola registaro intencas militecigi la ŝtatajn fervojojn.

En Polio ekzistas leĝo de 1920, laŭ kiu la fervojoj dum milito estas administrataj de militestraroj. La registaro nun prezentis al la parlamento amendon, kies akcepto ebligas al la ŝtato subigi la fervojojn al la militistoj ankaŭ dum la paco, se la „ŝtataj interesoj“ ĝin postulas. Striko k ĉiaj malhelpoj en la trafiko povas esti punataj per karcero de 5 jaroj k pli, ĉiuj fervojistoj, ankaŭ pensiitoj, aĝaj ĝis 60 jaroj, povas esti devigataj al la fervoja

servo ktp. La registaro kompreneble per tiu amendo celas fari senrajtajn soldatojn de l' diktatorecaj generaloj el la fervojistoj. La organizita laboristaro en Polio reagas forte al tiuj planoj. La cenzuro konfiskis la tutan protestartikolon en la sindikata organo. Malgraŭ ĉiuj protestoj la obeema parlamenta plimulto akceptis la registaran proponon. *Laŭ ITF-gazetservo, n-o 11.*

Murdita socialdemokrata Regna-Standard-ano.

En la urbeto Riza (Riesa, Saksio) estas fimurdita dumnokte de faŝistoj (Hitler-anoj) socialdemokrata Regna-Standard-ano. La laboristaro estis treege ekscitita pro tiu okazo. La entombigon, kiu okazis la 14-an de novembro, partoprenis kvar mil personoj; gelaboristoj vojaĝis multnombre al Riza. Estis granda manifestacio; oni vidis inter la funebrantoj ankaŭ uniformitajn komunistojn. La unuan fojon estis videble, ke Regna-Standard-anoj k komunistoj marŝis komune... kio estus imitinda ankaŭ en aliaj aferoj. Sed — ...!

14 510.

Senlaboruloj batalas en Ĉeĥoslovakio.

En ĉeĥoslovaka Silezio, en Lindeviece, eksplodis sanga batalo inter ŝtonlaboristoj k ĝendarmoj. La laboristoj provis organizi liberaeran kunvenon malgraŭ polica malpermeso. Kiam la ĝendarmoj provis ilin malhelpi, la laboristoj sin defendis. Tiam la policanoj ekpafis k mortigis 7 laboristojn k vundis 14. Ĉe ekscio pri la afero okazis tumultego ĉe la parlamento; faŝista deputito estis forpelata de la tribuno. *P. M.*

La „nova reĝimo“ en Jugoslavio.

La ekonomia krizo atingas gigantajn proporciojn dank' al la diktatoreca administrado. La studentaj manifestacioj, kiuj okazis dum la unua duono de novembro ĉe la Belgrada universitato, finiĝis per multnombraj arestoj. La polico agis rilate la studentojn per ekstrema bruteco, tiel ke unu el la arestitoj mortis pro la torturoj k alia havas la brustostojn rompitaj. *P. R.*

DISKUTEJO:

Ĉu la proletoj estas socialistoj?

K-do Pensemulo tuŝis tiklan problemon (en „S-ulo“ n-o 370/71), skribante pri la „demokratigo“ de l'mizero. Estas vere, ke kelkaj specoj de laboristoj atingis iajn privilegiojn (pli altan salajron ktp.), ofte je kostoj de aliaj laboristo-specoj. Kiel tiuj privilegiitoj kondutas? Ĉu ili sintenas konforme kun la ideo de solidaro laŭ sia politika konvinko socialisma? Nu, ni konfesu, ke tiuj „K-doj“ preskaŭ senescepte estas firme ligitaj kun la akiritaj privilegioj, ke ili ŝatas luksaĵojn k entute batalas precipe por siaj avantaĝoj, ne por la socialismo (kiun ili nur identigas kun siaj interesoj). Ne estas dubo, ke tiel *parto* de la proletaro *etburĝiĝas*, unue laŭkutime, poste laŭidee. Tiun etburĝiĝon unuavice montras la *gvidantoj* de lab. partioj, partoprenante pure burĝajn kutimojn en la vestado k aranĝo de sia hejmo ktp. anstataŭ konsekvence rifuzi tion. Niaj laboristaj gvidantoj ja nur *reprezentas* ideon, — kontraŭe ekz. al Gandhi, kiu *vivas* laŭ ĝi. (Eĉ *en* la lab. partioj oni diskutas pri tiu fakto.) Ni indignas pri tio, ke kapitalistoj ie detruas nutraĵojn, dum milionoj da homoj malsatas. Sed ni estu sinceraj! Ĉu ne proksime de ni vivas miloj da *laboristoj*, kiuj elspezas sian monon por etburĝaĵoj[1], kvankam ili vidas la mizeron de siaj *samklasanoj?* Kie restas la tiom glorata solidaro? Ĉi tiu nur ekestas, se temas pri la profito de iu *kategorio* de laboristoj. Fervojistoj ja solidare agas, se la interesoj de ilia *profesio* estas en danĝero, sed ili tute konsentas la plialtigon de la veturprezo, kiun devas pagi aliaj laboristo-kategorioj. Same agas tramistoj, ŝtatoficistoj k aliaj profesianoj. La koncerna grupo ĉiam defendas sian avantaĝon, ne konsiderante la aliajn grupojn.

Miaj linioj nur atentigu pri la egoismaj elementoj, kiuj ankoraŭ regas la pensmanieron de la plimulto el la proletoj, eĉ se ili nomas sin socialistoj. Estas evidente, ke la socialisma sociordo ne toleros tiun staton k multaj starpunktoj devos cedi al pli justa konsidero. Tio jam estas pruvita en Sovetio, kie ministoj rajtas havi pli longan libertempon ol oficistoj. Tute prave, diras mi, oficisto. Sed demandu vialandan oficiston (socialiston), ĉu li konsentus tion! Vi estus mironta pri la respondo. La socialismo ne devas esti nur afero de pli altaj salajroj, ĉar tiel ĝi fariĝas batalo de ĉiuj kontraŭ ĉiuj. En Sovetio oni evitis tiun danĝeron, eksterminte ĉian pretendemon. La homoj tie vivas modeste, jen grava avantaĝo, kiun oni *erare* nomas domaĝo. Ŝajnas, ke la politiko de la komunista partio — tion mi konfesas objektive, kvankam mi ne estas ĝia membro — en tiu ĉi punkto moviĝas laŭ sufiĉe prudentaj instrukcioj.

Pripensu ankaŭ, Gek-doj, ke dum krizaj tempoj la laboristaro inklinas al skismo, malfortiĝas ĝia agadpovo, triumfas la faŝismo ktp. Kial? Ĝuste oni povus supozi, ke dum krizoj la laboristoj unueciĝus por pli sukcese povi kontraŭstari la malamikon. Sed kontraŭe! La mizeruloj radikaliĝas, ne spertante la solidaron de l'tutproletaro. (Tiu solidaro devus manifestiĝi en agoj, ne nur en vortoj.) La senlaboruloj malesperas k facile estas kapteblaj por kontraŭlaboristaj aventuroj (faŝismo, naciismo). La laborista klaso fariĝas malforta, ĝuste dum momento, kiam ĝi, laŭ logika konsidero, devus esti plej potenca, ĉar hardita per la mizero.

Jen, Gek-doj, *danĝeroj*, kiujn vi devas vidi, eĉ se tio ne estas agrabla por ĉiuj. Ju pli frue la proletaro likvidos siajn proprajn mankojn, des pli certe ĝi venkos. Ek al la diskutado!

Observanto.

[1] Danco, alkoholo, fingroringoj ktp.

Al „demokratigo“ de l'mizero en „S-ulo“ n-o 371.

Estas vere, ke inter laboristoj estas tro frapanta salajrdiferenco. En nia

EL LA LIBROSTOKO DE SAT

havigu al vi jenajn rekomendindajn legaĵojn:

Tolstoj, Kristanismo k Patriotismo. 111 pĝ. . . 1.20 mk.g.
„ Ĥodinka (Caro kontraŭ popolo.) 64 pĝ. . 0.60 „
Volter, KANDID. Sprita k pensiga rakonto, 162 pĝ. bind. 3 mk.g., broŝ. 1.70 „
London, la Fera Kalkanumo. 368 pĝ., bind. 3.50, broŝ. 2.60 „
Barbusse, Eklumo en la Abismo. 96 pĝ. . . . . 0.80 „
Lenin, Ŝtato kaj Revolucio. 160 pĝ. . . . . . . 1.– „
H. Zur Mühlen, FABELOJ. 56 pĝ. . . . . 0.60 „
Vortoj de K-do E. LANTI. 192 pĝ. . . . . 2.– „
Kropotkin, ETIKO. Grava prez-plimalaltigo, 240 pĝ. . . nur 1.20 „

ADMINISTREJO DE SAT, Kolmstr. 1, LEIPZIG O. 27.

lando tiu diferenco estis 1:6, t.e. fervoja direktoro ricevis sesfoje pli ol laboristo. Sed baldaŭ burĝoj sukcesis starigi 1 : 8,6 k tiel la diferencon pligravigis. Tuj post la socialdemokrata dispartigo de bienoj, multaj senposeduloj ekhavis eĉ en urboj posedojn. Tial la vicoj da geproletoj tre maldensiĝis. Post ĉi tiu procedo la laboristaro tre plidekstriĝis; tion montras la lasta baloto, en kiu la demokrata centro plej multe gajnis. Socialdemokratoj, pro dispartiĝo — malgajnis. Ĉu la laboristoj-etposeduloj estas kontentaj? Tio ne povas okazi, ĉar diversspeca konkurenco ĉiam minacas al ili. Pro ligo al posedo oni tre konkuras la salajron inter si. Oni preskaŭ ĉiujn siajn fortojn metis en la posedon k perdis la klaskonscion; ĉar la poseda animo aŭ intereso estas ĉiam pli forta k superas la salajran, kiu gardas pli posedaĉon, ol laborkondiĉojn. Se proleto tuŝas iel tiun posedaĉon, estinta laborfrato atakas same kruele kulpuleton kiel kapitalisto k estas pli danĝera ol la lasta.

Latviano.

Internacia transportlaborista federacio (IFT) Amsterdam

komunikas al la tutmonda fervojistaro, al la personaro de ĉiuj elektro- k strat-tramvojoj, ŝoforoj, al ĉiuj havenlaboristoj, kiuj estas organizitaj ĉe ITF, ke en la jaro 1932 de 8. ĝis 13. aŭgusto okazos en Praha (Ĉeĥoslovakio) la internacia kongreso de ĉiuj sindikatoj organizitaj en ITF. Ĉi tiun kongreson partoprenos krom multnombraj gastoj la delegitoj el pli multe ol 40 internaciaj asocioj, unuigitaj en la Amsterdama federacio.

En la sama kongreso okazos ankaŭ la 12-an de aŭg. la konferenco de l' delegitoj, kiuj scipovas paroli esp-on, kiu estis en la kongreso en Madrido oficiale akceptita de l'internacia trafikkomitato kiel tre taŭga interkomprenilo por la internaciaj rilatoj.

Internacia Transportlaborista Federacio. Vondelstraat 61, Amsterdam.

Kiel mi iĝis anarkisto k SAT-ano.

Mi naskiĝis, en la jaro 1909, en Rigo, la ĉefurbo de Latvio (tiam provinco de Rusio). Miaj gepatroj estis laboristoj. Preskaŭ mian tutan infanecon mi pasigis en Rigo. En tiu urbo mi ankaŭ travivis ĉiujn malfacilaĵojn kaŭzitajn de la mondmilito. Dum la revolucio mi vidis, ke la popolo fratece kun la soldatoj renversis la caran potencon. Mi ĉiam rememoros tiujn glorindajn tagojn, kiam regis la popolo mem. Mi ankaŭ memoras la alvenon de l'blankuloj (naciistoj, monarkistoj k.a.), iliajn fiagojn, la pastran potencon k buĉadon al miloj da laboristoj. De tiuj tagoj, kvankam infano, mi iĝis kontraŭulo de l'pastraj religiaj dogmoj k sendiulo. Pro malbonaj vivcirkonstancoj en la urbo, la gepatroj forlasis ĝin k ekloĝis en provinco. La patro dungiĝis sin ĉe iu bienposedanto kiel laboristo k mi ĉe alia kiel paŝtisto.

Laborante de sunleviĝo ĝis sunsubiro, vidante la vivon, kiun vivis la mastro, mi ekkomprenis la diferencon inter mi k li, inter ekspluatatoj k ekspluatantoj. De tiu tempo mi favoris al ĉiuj tielnomataj laboristaj partioj. Poste mi translokiĝis al la urbo Jelgava k aktive partoprenis en la socialista junulara sportmovado (en 1927).

Post mallonga tempo mi ekvidis, ke la gvidantoj, kiuj estis en oficejoj, parolis ĉe amaskunvenoj pri revoluciaj agoj, sed dum membrokunvenoj penis agiti al kunlaborado kun burĝoj en ŝtataj oficejoj. Mi komencis malkredi al ili. Sed kiam post malsukcesa ribelo en Litovio kontraŭ la faŝistojn litovaj politikaj elmigrantoj kolektiĝis en Polio, mi aliĝis al ili k neleĝe transiris la latva-polan limon por batali kontraŭ la litoviaj faŝistoj (en 1927).

En la jaro 1928 mi transiris la litovian limon portante kun mi kontraŭfaŝistan literaturon kaj estis arestata. Rezulto estis kondamno je 15 jaroj da malliberejo. Estante malliberulo mi eklernis esperanton k ricevis unuajn informojn pri anarkismo k SAT. Post 30 monatoj okazis amnestio k mi revenis Latvion. Nun mi estis rigardata kiel suspekta homo. Trifoje oni arestis k reliberigis min. Post la reveno mi estis elektita kiel komitatano de l'Laborista Sport-memdefenda Asocio en Jelgava (socialdemokrata). Mi penis en mia organizo fortigi la klasbatalan konscion, rompi la kompromisan politikon. Tiam la ĉefkomitato volis min eksigi. Sed la membroj kontraŭstaris tion, k la gvidantoj malsukcesis.

Poste mi mem iom post iom malproksimiĝis de la socialdemokratoj. En iu malnova esperanta gazeto mi trovis la adreson de l'Anarkista Junular-Internacio. Mi tuj aliĝis ĝin k abonis ĝian „Informservon". Poste mi ekabonis al „Libera Laboristo", organo de Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj. En aŭgusto ĉi-jare mi aliĝis al SAT k abonis „S-ulo"n. Nun dank'al esperanto mi havas interrilatojn kun K-doj en kelkaj landoj k esperanto helpis al mi trovi vivcelon — Anarkion!

A. Neselbergs (17 457), Latvio.

MALDECO K KLERIGO.

Iam mi legis en „S-ulo": „Ni havu la kuraĝon ĵeti lumon" Certe, tio estas tre necesa inter la virinoj. Sed — tiajn belajn vortojn ni ofte povas aŭdi aŭ legi; tamen, kiel trafi la efektivigon?

Ekzistas jam tiom da organizoj, kiuj transprenis la taskon de l'klerigo, sed pri ilia sukceso ni ĝis nun nur malmulte aŭdas. Per afiŝoj tiuspecaj organizoj propagandas por la seksa klerigo al la laboristaro. Estas aranĝataj multaj lumbildparoladoj, vizitataj de granda amaso da personoj, kiuj deziras scii ion pri ĉi tiu afero. Sed kian impreson la ĉeestantoj ĝenerale havas dum partopreno al tiaj kunvenoj? Oni pritraktas ĝeneralajn aferojn, aŭdas, ke ni devus lerni ion rilate la seksan problemon, ke ni ne devus naski tiom da infanoj k nun sekvas tio, kio ne povas efiki je la laboristaro: oni estas petata aliĝi al la seksreform-unuiĝoj por aŭdi plion. Ĝuste tio ne estas pritraktata, pri kio la vizitantoj volas instruiĝi. Tiuj, kiuj ne havas monon, ne povas aniĝi k sekve ne kleriĝi. La monhavuloj aniĝas.

Al ili oni propagandas la diversajn kontraŭrimedojn k klopodas vendi ilin, sed tamen ne povas garantii. Dum la membrokunvenoj oni ankaŭ ne okupas sin sufiĉe pri klerigado; tiam la tempo estas uzata por pritrakti organizajn aŭ „politikajn" aferojn, k tiel la membroj, ne multe instruiĝas.

Prave K-do 8207 diris: „Feliĉo plejparte baziĝas sur plezuro", sed laboristoj, ne havante monon, devas rezigni je feliĉo. Ĝenerale ili timplene seksinterrilatas k ne pro sia „feliĉo", sed por krei kanonnutraĵon. La virinoj, aŭ simple la gelaboristoj, restu stultaj, estas la universala devizo; neniel oni helpas. Se foje iu bonkora kuracisto faris escepton, tiam jam minacas al li la karcero. Dum la konferenco de la germanaj kuracistoj, la 16-an de junio 1931 en Kolonjo, la prezidanto d-o Huedenkamp kontraŭis per hipokritaj vortoj la propagandon al interrompo de l'gravedo. Kaj en la frazoj li citas, „ke jam nun, tieldire, degeneras la germana popolo k la kuracisto ne rajtas forigi la sintrude postvenantajn fortojn, kiuj progresigas k fortigas la popolon" ktp. Ni povas dubi pri la sana menso de tiaj sciencistoj, kiuj jam konstatas degeneron en la popolo, sed ne kuraĝas malgraŭ tio malhelpi, ke homoj malsanaj je „korpo k monujo" produktu idojn.

Ni scias, ke la virina problemo estas parto de la socia problemo; ĝi solviĝos tiam, kiam estos solviĝanta la tuta socia problemo pere de socia revolucio.

H. F. (13 563).

POR NIA MEDITO.

La kapitalismo estas arbo, kies frukto estas la socialismo. *K. Marks.*

*

Supera homo neniam estas resumo de jam ekzistanta civilizo. Li estas la fonto k la origino de nova stato de civilizo. *G. Brandes.*

*

La intelekto *de l'homoj per inventoj aliigas la materiajn kondiĉojn de la socio k tiel kreas objektivajn kondiĉojn favorajn al revolucioj; sed la* koro *de l'homoj kun siaj pasioj* faras *la revoluciojn.*

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.

La lukto de du malamikoj de l'laboristoj.

De Mina Speĥt.

Ne estis ia kultura batalo, kiu nun estis finita per pacigo inter Pio la XI k Musolini. Du potenculoj reciproke vidigis al si la ungegojn; tiam ili faris batalhaltigan kontrakton, kiu permesas al ĉiu, sin turni al aliaj konfliktoj lin premantaj. Musolini k lia ministro por eksterlandaj aferoj, Grandi, devas observi la ekonomiajn okazaĵojn en la mondo; precipe ili devas atenti, kion intencas Francio fari kun sia oro, sia militista potenco, kun sia politiko sur la Balkano. Pio la XI havas malpacojn kun Litovio, kiu traktas konkordaton kiel paperaĉon; en Meksikio, li devas refortigi la pozicion de l'katolika eklezio, k li devas zorgi pri Hispanio, kiu altgrade rifuzas plian obeon al la eklezio. Ĉu tie estiĝos vero la frazo: „Senfrukte ĝi estas farita, la laboro de multaj jaroj!"[1] Tian rezulton, Romo ne povas akcepti. Pacienco k prudento necesas en tia tempo, sed precipe nenia dispartigo de l'forto je diversaj frontoj.

Kio interesas ĉe la itala konflikto, estas nur tio — kion oni cetere povis scii jam dekomence: La paco, kiu en 1929, ĉe la finkontraktigo de l'Lateran-Konvencio, estis solene proklamita al la tuta mondo, ne estas vera paco. Ne estas eble, ke la faŝismo de Musolini interkonsentu kun la ĉefpastra pretendo de l'papo; ĉar ambaŭ pretendas kompletan subiĝon de l'homoj sub iliaj celoj. Tiom longe, kiom neniu el ambaŭ rezignas tiun pretendon, ĉiuj kontraktoj por limigo de iliaj potencaj postuloj estas interne malsinceraj.

Tial ankaŭ plue daŭras la batalo de ambaŭ potenculoj, sub la ekstera aspekto de paco. La centro de tiu ĉi batalo estas la lukto pri la junularo; ĉi tie, neniu povas cedi la kampon al la alia. Ĉar fantomojn oni devas encerbigi jam frue, por ke ili fikse restu; oni devas ilin planti en la fundon de l'infana konfido, kiun ankoraŭ ne tuŝis ia dubo.

Krom tiu tasko ekzistas la lukto pri la animoj de l'laboristoj. Kiam, ĉi-jare, la papo proklamis la jubileon de l'„laborista" enciklikо „Rerum novarum", tio okazis ne nur pro la memoro, sed ankaŭ por „konfirmi la kredon, kiu rekondukas la mondon de l'laboro al la piedoj de l'roma papo"[2]. Arnaldo Musolini, la frato de l'*duĉe*, tuj respondis tiun proklamon, tiun „emfazan manifeston", en la „Popolo de Italio". Treege de supre li juĝis pri la kristana „patronemo", kiu teorie ja estus tre bona k sincera, kiu tamen ne estus efektivigebla en la ĉiutaga vivo — k kelkajn tagojn pli poste li skribis en „Laboro", laborista gazeto, ke sole la faŝismo enordigas la laboristan klason en la nacia vivo k firmigas ĝin en la plenumo de ĝiaj devoj k per la rekono de ĝiaj rajtoj. Tio ne estus „prapatraj opinioj", sed rekonitaj rajtoj, kies bazo estas ne „la perfekta lingvo latina de enciklikо", sed „la realaj fundamentoj de forta ŝtato"[3].

En tiu lukto pri la junularo k laboristaro de l'itala popolo, la faŝistoj apogas sin sur multaj, ŝtate subtenataj asocioj; la eklezio organizas ĝin helpe de la „Katolika Ago", de la laika unuiĝo por subteno de l'pastra regado, kiu estas disvastigata tra la tuta mondo. La Lateran-Konvencio precipe fiksis la toleradon de l'Katolika Ago en Italio — sub la kondiĉo, ke ĝi ne okupiĝu pri politiko. Tiu ĉi kondiĉo enhavis la ĝermon de l'nova konflikto. Ĉar, kio estas „politiko"? Katolikaj pastroj k laikoj komencis organizi junularajn asociojn katolikajn, kies membraro kreskis rapide. Ili komencis fondi profesiajn unuiĝojn ekster la ŝtataj sindikatoj, kun instruaj kursoj, kasoj por subteno, profesiaj konsultejoj. Politiko? Ne! Ĉi ĉio servis nur por akcelo de religiaj, moralaj, kulturaj celoj! La itala registaro havis alian opinion: „La ‚Katolika Ago' estas nur malbone kaŝata provo, restarigi en nova formo la antaŭan Popolan Partion Katolikan, kiun la faŝistoj malpermesis."[4]

La batalo ekflamis en ĉia maniero, kun diplomatiaj notoj de ambaŭ flankoj, kun strataj interpuŝiĝoj, kun malpermeso de katolikaj asocioj fare de la registaro, kun papa plend-skribaĵo al la tuta mondo.

Kaj tiam, subite la paco!

La Katolika Ago daŭras. — Laŭ siaj religiaj celoj, la Katolika Ago ne okupiĝas pri politiko. — En ĝia programo ne troviĝas la fondo de metiaj unuiĝoj. — La samtempa membreco al la Katolika Ago k al la faŝista partio estas permesata.

Tio estas paco inter advokatoj, kiuj posedas la senskrupulecon fari kontraktojn, kies interpretadon ili lasas al bataloj pri povo! Pri klarigo, pri *spirita* lukto de du mondkonceptaroj — nenia vorto! Certe, la Katolika Ago estas retenata en sia antaŭeniro; ĝi devas eltrovi novajn vojojn. Sed ĝi vivas — tiu organizo, pri kiu la papo deklaras, ke ĝi estas la bazo k apogo de l'publika progreso; k kiun ĝia prezidanto opinias kapabla, ke ĝi estus savinta Hispanion el la manoj de la tieaj „krimuloj".

Ne! Kultura batalo ne okazis tie ĉi. Batalon kontraŭ la eklezio riskis Meksikio, okazigas Sovetio, komencis Hispanio. Nepra kondiĉo por tia batalo estas la ekzisto de *konvinko*, kiu direktiĝas kontraŭ superstiĉo k eklezia subpremado. Tia konvinko, kiu ebligas principan batalon kontraŭ la eklezio, tute ne ekzistas ĉe la nuna reganto de Italio. Li forĵetis sian kontraŭ-ekleziecon, kiam ŝajnis rekomendinda, aldoni la brilon de l'Sankta Romo al la brilo de l'faŝismo. Tia homo ne brulvundas siajn fingrojn ĉe la fajro de iu eklezio, precipe ne ĉe la katolika eklezio, kun kiu li loĝas najbare. Kiam la Vatikano (la katolika estraro) utilas al li, tiam li toleras ĝin, koncesias al ĝi lernejojn, familiajn registrejojn, ja, eĉ kelkajn kvadratkilometrojn da tero. Kiam la Vatikano ĝenas lin, tiam li permesas al la faŝistoj, bastoni sur la stratoj katolikajn junulojn, detrui episkopajn administrejojn k moki en la gazetaro la „sanktan patron". De tia kontraŭulo de l'eklezio liberpensuloj povas atendi nur tre malmulte. Kompreneble, ili ĝoje akceptas, se Musolini malfortigas la eklezion. Sed la bruo dum la pasinta somero, pri kies disaŭdigo zorgis ne nur Musolini, sed ankaŭ tre bone la eklezio, ne estis tiom grava. El la nun farita kontrakto ja rezultas kelkaj domaĝoj por la eklezio, sed samtempe la batalo donis al ĝi novan forton ekscitante kompaton en la koroj de la kreduloj. Do, entute ĝi kaŭzis verŝajne eĉ ne tiom da domaĝo, kiom kaŭzas liberpensuloj, kiuj sen bruo eksiĝas el la eklezio.

El germanlingva „ISK" n-o 10, okt. 1931.

[1] Ŝiler: „Don Karlos".

[2] „Ecclesiastica" (katolika korespondaĵaro) n-o 27, 4. julio 1931.

[3] Samloke, n-o 28, de 11. julio 1931.

[4] „Mallongaj Informoj Germanaj", kajero 36, 3. sept. 1931.

LASTHORE: La XII-a SAT-Kongreso okazos en Ŝtutgart. La unua komuniko aperos en la proksima n-o.

Por ke „LNE" pluvivu!

16599 Duif (Amsterdam) guld. 0.50

DEVA-SKANDALO.

Tie, kie estis okazo trompi, la eklezio kunagis. Se homo naskiĝis, la pastro gajnas. Se homo mortas, denove la pastro gajnas. Se forbrulas ies domo, la pastro gajnas. Rompiĝas ies kruro, ree la pastro gajnas. Pluvas tro multe, li gajnas. Ankaŭ li gajnas, se pluvas tro malmulte. Estus miraklo, se li preterlasus ekspluati la loĝejmankon de la eklezianoj malsatantaj k senloĝejaj.

La trompo al 22 000 germanaj ŝparantoj, kiuj volis konstrui domojn, nur estas la komenco. Malrapide klariĝas, ke temas pri 10 milionoj da mk. g. La surpriza fino ankoraŭ venos: Pastroj estas elokventaj silentemuloj samkiel parolantoj. La DEVA-Hejm-skandalo ja nur respegulas la putradon de la hodiaŭa sociordo ne plu kaŝeblan. La bilanco estas simpla: kasoj estas malplenaj. La 22 000 perdis eĉ la lastajn pfenigojn ŝparitajn dum longjara mizervivado.

Ĉi-foje ne ekzistas „enviantoj" – ili ĉiuj ĉeestas. Ĉiuj, kiuj iel interrilatas kun dio, ĉiuj, kiuj estas interesataj al la konservado de stulto k ekspluato. Apud la bankrota DEVA (German-Protestanta Loĝejkompanio A.S.) staras la Kaso por publika bonfarado pridiskutenda, la „helpkaso komunutila por entreprenoj bonfaraj en Germanio", kiu estas fondita en 1923 kiel kuratora k ĝirsocieto pri la ŝtata mono, per kiu estas investitaj la privatsocietoj praktikantaj publikan bonfaradon. 500 000 mk. g. kiel societkapitalon donis, prenante ĝin el impostmono, la regna laborministro. Sed asociitoj fariĝis la centra komitato por la interna misio de la protestanta eklezio per 40 %, la katolika *Karita-asocio Germania* per 40 %; la centra bonfarsocieto por germanjudoj per 10 % k la germania Ruĝa Kruco per 10 %. Nun komenciĝis la bonfarado „publika", nome: Regno k komunumoj malaltigis la subvencion al la proletoj, viktimoj de l'raciigo, k la salajron al la laboristoj, transdonante la monon al la pastraro. Kie restis la mono? Tion la impostpagantoj k piuloj eble neniam ekscios. La nigruloj estas en la administrado same „grandaj" kiel per la buŝo sur la pupitro. Altoficaj pastroj ricevis malkaran konstru-monprunton, la direktoroj konstruigis por si tre belajn kampodomojn. Oni distribuis la monon laŭ kristanaj principoj, ĝojigante per tio la partoprenantajn judojn. Tuta aro da interplektitaj societoj, inter kiuj eĉ ne mankis margarinfabriko, malebligis ĉiun kontrolon de ekstere.

Trompante la ŝtaton, ekspluatante la piajn anojn, ili ĉiuj adoras nur unu dion laŭ unika ŝablono. La diferenco ekstera nur estas la blazonŝildo por la bravaj ŝafaroj impostpagantaj, por ke ĉiu kredu, ke lia animsavo estas sekurita.

El tiu ĉi „Publika bonfara kaso" ekiĝis la skandalo. Kiam en ĝi, administrita k kontrolita de ĉefestraro de la ŝtate patentitaj eklezioj, ne plu estis mono „distribuenda", oni trompŝtelis la milionojn de la ŝparuloj loĝejkonstruontaj. Kaj kiam ankaŭ ĉi tiu mono estis distribuita, la skandalo ne plu estis evitebla.

H. F. D.

TRA ESPERANTIO

Publikaj leteroj al multaj SAT-anoj.

Enkonduko.

Per la precizaj nombroj publikigitaj ĉi-apude, la legantoj povas ekkoni la rezulton de la referendumo. Ĝi estas klara esprimo de aprobo k fido al la nuna gvidantaro de SAT. La voĉdonado, laŭstatute aranĝita k severe kontrolita en Lajpcig de tiucele funkciinta komisiono, eldiris definitivan verdikton pri la konflikto estiĝinta inter la Opozicio k la Plenum-Komitato. Ni do povos baldaŭ rekomenci pozitivan laboron k daŭre sekvi la vojon de la plimulto aprobitan. Sed antaŭe necesas iom ripari la difektojn k ŝtopi la breĉojn, faritajn de partieca fanatiko, senbridigita k eĉ intensigita de malnoblaj fortoj . . .

Unue ni provu vidi klare la situacion. Al tio helpos nin la *121* leteroj, kiujn sendis K-doj kune kun sia voĉdonilo. El ili 102 estas skribitaj de K-doj, kiuj voĉdonis aprobe k la ceteraj (19) esprimas malaprobon.

Tiuj dokumentoj estas tre instruaj. Tiom pli, ke ili venis el plej diversaj mondpartoj. Unu kun konsiderinda enhavo eĉ venis el la malproksima Ĉinio. Krom malmulte da esceptoj tiujn leterojn skribis K-doj, kun kiuj mi neniam korespondis k neniam havis okazon buŝe interparoli. Pro tio ankaŭ la skribaĵoj estas tre atentindaj k primeditindaj.

Ilia legado konvinkis min pri la neceso respondi al kelkaj. Kaj tion mi volas fari publike; la koncernaj demandoj ja havas intereson por la tuta SAT-anaro. Mi ne citos nomojn, tial ke ofte la samaj punktoj estis tuŝitaj de pluraj K-doj. Sed la skribintoj certe ekkonos facile, ke mia respondo rilatas al ilia letero.

Kaj sen ia ĉirkaŭfrazo: al tiuj, kiuj krude eldiris la opinion, ke SAT fariĝis „kontraŭrevolucia", „kontraŭsovetia", „socialfaŝista" ktp. ks., mi ne respondos. Estas evidente, ke ĉiu ajn racia argumento, eĉ la plej valora, ne povus ŝanĝi la kredon de tiuj K-doj. La racio estas senpova antaŭ la pasio. Nur la tempo, la spertoj, la aliiĝo de cirkonstancoj povas kuraci homojn, kies cerbo estas infektita de pasio. Tiajn infektitojn ni simple kompatu . . .

Al tiuj – la granda plimulto – kiuj skribis entuziasme k plene aprobe, mi ankaŭ ne respondos. Ili nur estu dankataj pro siaj kuraĝigaj vortoj.

Kaj nun ankoraŭ unu vorton: Sendube miaj leteroj havos karakteron iomete personecan. Ĉu eviteble? Neniel. Estas ja neforigebla fakto, ke la Opozicio direktadis – k eĉ daŭre direktas – siajn pafojn al mi. Pluraj n-oj de la ruslingva revuo de SEU estas preskaŭ tute plenigitaj per plej krudaj insultoj k mensogecaj „argumentoj"; same en la dulingva Moskva Bulteno. Kompatindaj estas la Sovetiaj K-doj, pro tia *unuflanka* „informado". Mi tamen esperas, ke ilia prudento scipovos ĝuste taksi tian atakadon al iu, kiu ne povas rebate aŭdigi sian voĉon . . .

Rezulto de la referendumo

pri la fiddeklaro al la Plenumkomitato k aparte al K-do Lanti.

La Administracia Komisiono, kunveninta la 24. XI. 1931, konstatis post zorga kontrolo jenan rezulton de la voĉdonado:

Voĉdonis per JES	877
Voĉdonis per NE	171
Sin detenis	1
Nevalidaj	22
Partoprenis sume	1071

Stato de la *aktiva* membraro: 2045. Tio signifas, ke 50 % partoprenis la voĉdonon.

Lajpcig, la 24. novembro 1931.

H. Siedentopf (2056), Ad. Wendt (2518), H. Bönisch (11 624).

Por komparo ni citas la nombrojn el la antaŭaj voĉdonoj:

1928 voĉdonis 1133 el 6023 anoj, t. e. 18,8 %;
1929 voĉdonis 1831 el 5170 anoj, t. e. 35,4 %;
1930 voĉdonis 1397 el 6412 anoj, t. e. 21,8 %;
1931 voĉdonis 647 el 1982 anoj, t. e. 32,6 %.

Oni rimarku, ke en la jaroj 1928–30 aktivaj membroj estis ĉiuj ajn, kiuj pagis la simplan kotizon (scipovantaj esp-on); dum en la du lastaj referendumoj (ĉi-jaraj) voĉdonrajtaj estis *nur* membroj aktivaj laŭ la enstatutigita formulo akceptita ĉe la Lajpciga Kongreso (1929) k per la referendumo en 1930, nome membroj abonantaj „S-ulo"n.

En ĉiu n-o de „Isto“ granda parto el la enhavo estas ankaŭ dediĉita por atakoj kontraŭ min persone. Mencieblaj krome estus nacilingvaj gazetoj, kiuj kunpafas per samvalora, kalumnia municio . . .

Neniam vizitis min la supozo, ke mi estas tiom danĝera homo, kiun oni nepre devas entombigi. Sed la legantoj estu trankvilaj: mi ne intencas repafi al la atakantoj. La personeca karaktero de miaj leteroj havos kiel celon nur igi pli facile kompreneblaj kelkajn el miaj respondoj.

La K-doj el la Direkcio de SAT, kun kiuj mi kunlaboras jam de pli ol dek jaroj povas atesti, ĉar ili konas min intime, ke ĉiam mi estas preta plenumi tute *anonime* iun ajn taskon. Sed ili ankaŭ scias, ke mi ne rifuzas akcepti respondecon k ne forkuras dum la batalo. Tio estu la pravigo pri la personeca karaktero de la projektitaj skribaĵoj.

Espereble la legontoj ekkomprenos ankaŭ, ke necesas iafoje porti lumon en k aerumi ĉiun malhelan lokon. Ili do rilatu kompreneme al tiuj publikaj leteroj, kies unua aperos en la proksima n-o.

30 – XI – 31. E. L.

La malhonestuloj timas la veron.

Ili rabas nian monon (12 000 mk.) k plie nin insultas. Lojalulojn el la organizo ili nomas ŝafaro. Timante la veron, ili denunce zorgas, ke la anoj en USSR ne povu havi kontakton kun ni. Korespondanto sendis al mi ĉefartikolon el la „Bulteno de SEU“. Li ne povas konstati, ĉu ĝi diras la veron. Ĝi asertas, ke „la direkcio, preparante sin al la Xa Kongreso, zorgis forigi de funkciaj postenoj ĉiujn revoluciajn K-dojn; per ĉesigo de Informserva paĝo en ‚S-ulo‘ ĝi fakte nuligis Informservon k forigis K-don Besler de gvida laboro; ĝi preparis la grundon por forpreni redaktadon de ‚la Nova Epoko‘ el la manoj de Moskvaj K-doj; ĝi atingis eksiĝon de Odesaj K-doj el gvidado de Literatura Komisiono, ignorante ĝin k eldonante verkojn eĉ sen ĝia scio; same la dir. preparis la grundon por transporti K. K. el revolucema berlina grupo al iu alia loko . . .“ (Bulteno de CK de SEU, sept/nov. 1930).

Por sciigi al mia korespondanto la veron, mi bezonus nur kopii el la „Protokolaro pri la Xa Kongreso“ mem: Mi legas (paĝo 8): „K-do Vildebrand sciigis en letero de 2. marto 1930, ke la K.K. *unuanime* decidis rezigni siajn funkciojn.“ Pli sube: „En marto 1930 la Lit. Kom. en Odeso likvidiĝis pro troa okupiteco“. Paĝo 9: „La 19. febr. 1930 K-do Besler sciigis nin pri sia deziro forlasi sian postenon ĉe Esp. Servo pro troa okupiteco.“

Kial la rabistoj mensogas kontraŭ ni? Ĉu ili povas vere celi al iu bono por la proletaro? Ekz., ĉu liberpensulo timas religiulon? Tute ne: li volas lin liberigi el la kredo k klarigi la veron al li. Ĉu socialisto timas la vidpunkton de kontraŭsocialisto? Tute ne, ĉar li celas al pli bona estonto k celas akiri apogantojn el la nesocialistaj vicoj. Kial do SEU k Kio agas tiel fie? Demandu al vi, ĉu la pioniroj de nia movado, Marks aŭ Lenin, povus pravigi la rabadon de mono al laborista esp. organizo, kia estas SAT? Kvazaŭ tio ne sufiĉas, ili atendas ĝis la jarfino, kiam la kaso estas tute malplena, por procesi kontraŭ nin. Kapitalisto, faŝisto volonte disrompus lab. organizon. Sed kiam s-ro Dr. k Kio tion penas fari, k alprenas al si la nomon de komunistoj, ili ja malindas je la komunismo, ili mallevis ĝin en la koton. Ili montras sin faŝistoj. Neniu klaskonscia proleto timas la veron; li bazas sian opinion, same kiel scienculo, sur objektiva vero. Li volonte bonvenigus la malveron k la distordojn por ilin forbalai. Niaflanke ni tute ne timas la maliculojn. Ni, la pioniroj de la proleta esp. movado, antaŭeniros, konfidante, ke la malicĉuloj same kiel la idistoj malaperos.

Londonano.

Tra la esperanta gazetaro

Bona novaĵo el Svedio! Post iom longa dormado k periodo de neregula aperado jen la „Sveda Laborista Esperantisto“ en sia oktobra n-o promesas de nun akuratan aperon. Sub gvido de l'nova estraro la enhavo de l'SLEA-gazeto montras rimarkindajn ŝanĝojn. Antaŭ ĉio ni konstatas plezure la propagandon por SAT k ĝiaj eldonaĵoj. Depost decembro „La Lernanto“ estos liverata al la abonantoj. Ampleksa kroniko informas pri la movado en Svedio.

La „Esperanta ISK“ estas vere leginda revuo, kiu tenas sian promeson: ĝiaj artikoloj pri aktualaj problemoj de la laboristaro estas verkitaj kun granda zorgemo k objektivemo, kvankam kompreneble laŭ la partia vidpunkto de l'ISK-anoj.

La organo de l'Japana LEA ŝanĝis sian titolon: ĝi nomiĝas nun „Kamarado“. Ankaŭ laŭ amplekso la okt. k nov. kajeroj superas la antaŭajn. La plej granda parto de l'gazeto estas japanlingva; sed, juĝante laŭ la cetera enhavo ni konstatas, ke ĝi estas redaktata laŭ partifanatika spirito k remaĉas la devizojn de l'opozicigvidantoj. Ĉi tiuj „klasbatalas“ plue en „Internacisto“, kiu depost la Amsterdama SAT-Kongreso ne plu nomiĝas organo de l'SAT-opozicio, sed tia de l'formiĝonta Proleta Esp. Internacio. Aperis en ĝi cinika Deklaro pri la efektivigo de l'skismo: rekomendo eksiĝi el SAT k fortigi la vicojn de l'LEA-opozicioj aŭ de tiuj LEA-oj, kiuj estas sub ilia gvidado, kun celo fondi baldaŭ novan . . . Internacion k tiel efektivigi malnovan (sed ĝis la lasta tempo obstine neitan) planon. Cetere tiu gazeto aperas tre malakurate.

Ne malprave „Laborista Esperantisto“ (Amsterdamo) ĝojas pri la morto de la senprincipa „Holanda Esperantisto“, kies legantaro parte forfalos en la burĝan tendaron, parte plifortigos „Lab. Esp-isto“n. Efektive la impeta lastatempa antaŭeniro de la nederl. LEA-organo estas la ĉefa motivo por la formalapero de l'nomita gazeto.

La ekonomia krizego en siaj efikoj tuŝas pli malpli ĉiun esperantan entreprenon; nun ankaŭ la neŭtrala semajna gazeto „Heroldo de Esperanto“ pli ol unu fojon insistas pri la neceso ŝpari, limigi la elspezojn ktp. Tamen ĝi aperas regule en la ĝisnuna amplekso. En „Espero Katolika“ (de nov.) ni legas, ke IKUE (la katolika esp. unuiĝo internacia) stagnas kun 1931 anoj en la tuta mondo, el kiuj Nederlando sola liveras preskaŭ la duonon: 934 anojn. La gazeto aspektas nun malpli lukse k „Skolta Heroldo“, antaŭe memstara trimonata gazeto, nun estas parto de „Esp. Kat.“, servante ekskluzive al katolikaj skoltoj, dum la de l'pastro Rambu malbenataj „angloj“ eldonas propran skoltan bultenon. Krom tiuj gazetoj pledas por la esp. skolta movado nova gazeteto „Juna Samideano“, duone esp-a, duone pollingva: rezulto de junulaj klopodoj (aŭ eble nur de efemera entuziasmo!) ĉe la Krakova neŭtralula kongreso.

„Katolika Vivo“ (en la n-o 23) represigis sur la unua paĝo sub la titolo „Soveta konfeso“ informojn el . . . „Isto“(!) malutilajn al Sovetio. „Isto“ liveranta al la malamiko kontraŭsovetian materialon! Se io simila okazus ĉe „S-ulo“, kian kriaĉadon ni aŭdus!

„Oomoto Internacia“, sekta organo, ne restante ĉe religiecaj problemoj, enmiksiĝas (en sia novembra n-o) en politiko, k — ĉar la Oomota mistiko radikas en Japanio, ĝia eŭropa ĉefpropagandisto, s-o Niŝimura, stariĝas (kvankam sub iom vualita formo) sur la flanko de l'japanaj imperiistoj, pravigante ilian agadon en Manĉurio. Kiel supraĵaj estas la homaramaj ideoj de tiuj uloj k kiel profunda ilia nacieca sentado! Cetere la religiĉefo, s-o Deguĉi, havas sian portreton en ĉiu n-o, k oni povas admiri lian grasan korpon en la plej diversaj pozicioj, dum li pentras, dum li parolas, dum li preĝas, ripozas ks. Nemodesta sinjoro, kiu tamen komprenas evidente bone sian negocon!

N. B.

Socialista frakcio el SAT-k LEA-anoj.

Sekretariejo K-dino E. Klatil, Amsterdam-Z, Hectorstraat 4. I. Nederlando.

Dum la lastaj tri monatoj anoncis sin proks. 100 novaj anoj (sume nun estas en S.F. pli ol 1100), inter ili el

Danio, kie ni ĝis nun ne enpenetris. Ni dissendis alvokojn pri la S.F. al diversaj landoj, kiuj aperis jam kelkloke en soc. gazetoj. Rezulto: novaj anoj aliĝas. Konsiderante, ke nia anaro ĉiam kreskas, ni petas niajn anojn en ĉiuj landoj kie ne ekzistas soc. LEA-oj, aranĝi kunvenojn de la soc. esp-istoj por priparoli la aranĝon de propagando en socialistaj rondoj. En Amsterdam tia kunveno jam okazis, denove okazos en januaro; same oni intencas havi kunvenon dum la jarkongreso de F.L.E. En Francio ekzistas „Komitato por propagandi esp-on inter la socialistoj“, kiu fervorege laboras. Same en Belgio la laboro estas komencata. Tion ankaŭ aliaj landoj imitu k raportu pri entreprenitaj aferoj al la sekretariejo. Rilate la propagandon de esp-o ĉe internaciaj socialistaj instancoj ni preparas ion, pri kio ni raportos post efektivigo. – En Ĉeĥoslovakio estas fondata Ĉ.L.A.E. (Ĉeĥoslovaka Lab. Ligo Esp-ista), kies tendencon ni plej bone trovas esprimita en punkto de la Statuto, celoj, nome: „... praktika utiligo de esp-o por la interesoj de la liberaj sindikatoj, de la kulturorganizoj k de la tuta socialista laborista movado.“ – La nederlanda I.v.A.O. (Instituto por Lab. Klerigo), kiu aranĝas la klerigan laboron inter libersindikataj k soc. laboristoj, gvidas radio-esp.kurson, kiun partoprenas pli ol 500 lernantoj el tuta Nederlando. Interesa estas jena fakto: La sama instituto aranĝas diversajn kursojn en iu urbo en Nederl., inter ili ankaŭ esp. kurson, sed nur al la lasta anoncis sin tiom da partoprenantoj (36), kiom estas necesaj, por ke ĝi povu okazi. Kaj tio eĉ ne estis en ĉefurbo. – En Estonio fondiĝis „Junsocialista Esp.Klubo“; entute la junsocialistoj en Estonio multe okupiĝas pri esp-o k favore ĝin studas. – La supre nomita komitato en Francio sukcesis enpenetri ĉe soc. gazeto „Le Populaire“ esp-istigi du el ĝiaj redaktoroj k fervorigi aliajn. En diversaj soc. gazetoj aperas regule sciigoj pri esp-o. Ekz. en gazeto „Le Cri des Jeunes“, duonmonata gazeto de la soc. junularo en Francio, nia komitato disponas pri unu kolono en ĉiu n-o, regule, depost dec. tie aperos kurso. En la gazeto „Etudiant Socialiste“ (gazeto de soc. studentoj el Francio, Belgio, Svisio) nia komitato depost okt. gvidas regule „Esp.paĝon“. Por propagandi esp-on en socialistaj rondoj nia komitato eldonas 10 000 flugfoliojn franclingvajn, disdonotajn ĉe partio, junularo ktp. Gek-doj, raportu al ni ĉiujn sukcesojn de esp-o en soc. rondoj, per tio vi instigas la aliajn al plua laboro. – En „S-ulo“ 368 369, rubriko „Tra Esperantio“ ni povis legi noton de K-do 11 309 pri „Anglic“, per kiu li alvokas sendi al la sekretariejo de la S.F. protestleterojn. Alvenis 11 protestleteroj, inter kiuj ni vane serĉis leteron de K-do 11 309, kiu neniel informis nin ĝis hodiaŭ aŭ almenaŭ sendis al ni la koncernan gazeton, en kiu li legis pri la afero. Ni atentigas, ke ni neniel konsentas, ke iu ajn en alvokoj aŭ aliaj skribaĵoj uzas nian nomon k adreson tiel, ke ĝi aspektu kvazaŭ de ni mem skribita, kion lastan multaj Gek-doj opiniis. Ni rimarkas ankoraŭ, ke la sekretariejo nenion entreprenas en la afero „Anglic“, ĉar ni opinias, ke esp-o tute ne estas endanĝerigata de „Anglic“. – De la novaliĝintaj, same de kelkaj malnovaj anoj k ankaŭ pro la nuntempa situacio de la lab.internacia esp. movado atingis la sekretariejon plej diversaj demandoj pri la celoj k intencoj de la S.F. Per kelkaj vortoj ni respondas jenon: La S.F. volas arigi en si ĉiujn soc. esp-istojn de la tuta mondo, por per ilia morala k se eble financa subteno propagandi k utiligi esp-on en soc. rondoj, ĉefe ĉe soc. intern. instancoj. La S.F. ne enkasigas devigan kotizon k celas nur krei kontakton inter la soc. esp-istoj ĉiulandaj. Per esperanto – por Socialismo!

Klatilino.

Pli bona esperantisto
vi volas fariĝi? Tiucele nur partoprenu Superan esperanto-kurson perleteran. Postulu senpagan enkondukon! Adr.: Leono Funken, diplom. esp.instruisto, Moselweisserstr. 20, Koblenz, 52 (Germanio).

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Germanio. *Ŝvajnfurt:* Tra ĉiaj skismaj bataloj la lab.esp. grupo Ŝvajnfurt (SAT-rondo) sukcesis konservi la unuecon. Dank' al tiu fakto ni povis instali 3 kursojn ĉe lab. kluboj, kiuj funkcias kiel memstaraj rondoj. Iom progresintaj K-doj, kiuj jam kunlaboris en pasintjaraj kursoj, helpas nin. Ĉiudimanĉe kunvenas 15 K-doj progresintaj k la kursgvidantoj por ekzameni la laborplanon. Sume 85 p. studas k okupas sin pri esp. Ni atingis tion, kvankam la lab. gazeto ne nur ne raportas pri esp., sed eĉ aperigis „Anglic-artikolon“ – dank' al tio, ke ni estas unue K-doj, due esp-istoj k poste partianoj. (8384). Litovio. Ĝis nun ĉi tie ne estis lab.esp.movado. Revoluciaj esp-istoj vole nevole devis labori en neŭtralaj organizoj, kiuj, certe, en L. preskaŭ vegetas. Sed nun jam aŭdiĝas voĉoj por kreo de lab.esp.movado. Antaŭ la XI. kongreso de l'socialdemokrata partio en Lit. la ĉeforgano de l'partio „Socialdemokrato“ aperigis alvokon „Socialistaj esp-istoj organiziĝu“, en kiu oni alvokas krei Litovian LEA-on. Ankaŭ en tiu artikolo estis informoj pri SAT-vivo, „S-ulo“ ktp. Laŭ tiu alvoko jam komenciĝis kursoj en Kaŭnas, ĉe junulorganizo „Ziezirba“; same okazos kursoj en Alytus. Tio estos la fundamento por estonta LEA. La soc.dem.organo represis ankaŭ artik. el „S-ulo“ (K. Vincas). – Norvegio. *Oslo:* La 24-IX-31 estas fondita nova klubo sub la nomo „La Proleto“ el fervoraj esp. K-doj. Tuj aliĝis 20 partoprenantoj k la membraro daŭre kreskas. La klubo aranĝis jam du kursojn por komencantoj (gvidas K-do Magnusson), por progresintoj (gvidas: E. Johansen). Kunvenoj ĉiuvendrede en kafejo „Idun“. – Svedio. *Nynäshamn.* Funkcias 4 kursoj en kadro de Lab. Kleriga Asocio: komenc. kurso kun 26 p., daŭriga kurso kun 10 p., infana kurso kun 20 p. k konversacia rondo kun 10 p. Instruas laŭ Ĉe-metodo K-do W. Krey. (5486) el Lajpcig. Post lia parolado en SAT-rondo pri la financa SAT-krizo oni kolektis 7 kronojn „por ŝtopi la breĉon“. (5486).

EKSTER NIA MOVADO

La magistrato de Kan (Cannes) en Suda Francio decidis laŭ instigo de l'sekretario de la Provenca Esp. Federacio uzi esp-on por la trafik-signalado. De nun ĉiu indika tabelo, ĉu fosta, ĉu mura, estos redaktata france k esp-e. Tia aplikado de esp-o por la urba trafik-reguligo estas grava sukceso de nia afero en mondfama urbo, kiun trapasas aŭ en kiu pli malpli longe restas multegaj ĉiulandaj turistoj.

*

La granda oficiala libro pri la polustragedio de Andrée, „Per balono al la poluso“, fariĝis tre granda sukceso. El la tuta eldono restas nur ĉ cent ekzempleroj, kiujn la Stokholma esp. eldonejo konservos por la estonto.

*

La 24-a Univ. Kongreso de Esperanto okazos de la 30-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 1932 en Parizo. La oficiala invitanto de l'kongreso estas la Komerca Ĉambro de Parizo. Kongresa Oficejo: Maison de France, 101, Avenue des Champs Elysées, Paris VIII. Kongreskotizo: *125* francaj frankoj (la dekoblo de la SAT-kongresa kotizo!)!

*

La urbestraroj en Barcelono k Amjen (Amiens) donis al urbaj stratoj la nomon de d-o Zamenhof.

*

La I-a Internacia kongreso de turismo en Budapest decidis, post aŭskulto de esp-ista raporto, transdoni al la Org. Kom. de l'venonta kongreso proponojn pri apliko de esp-o en la turismo (vojmontriloj, presaĵoj, revuo, organiza koresp-ado ktp.).

*

Esp-o estas de nun oficiala parto de la lingvaj kursoj en la universitato de Liverpulo (Liverpool).

Plendo.
Je la 24. okt. mi skribis leterojn al Gek-doj Anne Ferd. Brosville, J. M. Beshels, Apeldoorn k Bengtsson, Kiruna (laŭ adresoj en „S-ulo“ 368/69). Ĝis la 22. nov. mi ne jam ricevis iun ajn respondon. – Kial?
Stefan Kirĥŝlager, Schmiedeberg i. Rsgb.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

K. Kalocsay: Lingvo, stilo, formo. Studoj. Eld. Literatura Mondo, Budapest. 142 pĝ. Form. 12×18 cm. Prezo: bind. 0.95, broŝ. 0.60 us. dol.

Jen vere rimarkinda verko, kies atentan tralegadon mi varme rekomendas al tiuj, kiuj aparte interesiĝas pri la lingvaj, stilaj k versofaraj demandoj. La aŭtoro estas unu el niaj plej talentaj stilistoj k poetoj; plie li prezentas siajn ideojn en perfekte klara k luma maniero. Profitante, pliprofundigante k pliprecizigante la laboron de siaj antaŭuloj, s-ro K. proponas al ni proksimume definitivan teorion, en kiu oni povas kritiki nur malmultajn detaletojn. Oni povas ankaŭ ne plene samopinii, kiel li, pri ĉiuj gramatikaj k leksikologiaj demandoj, kiujn li pritraktas,

Korektoj. – En la n-o 374/75 bonv. legi sur pĝ. 62 en la unua frazo de la letero („Voĉo de kompartiano“): „Leginte vian manifeston . . .“ (anst. manuskripton). – En la lasta koresp. anonceto, pĝ. 64, mankas la urbnomo post „Gruzinskij per. 6, kv. 6: *Niĵni Novgorod.*“ Bonv. aldoni!

sed oni ne povas ne admiri lian analizon de la necesa evoluo de la belliteratura k poezia vortaro. Tute prave li insistas pri tio, ke, laŭ ekstera aspekto, prononcado k sonsistemo, esp-o estas plej parenca al itala lingvo. El tio sekvas, laŭ mia opinio, ke la propra, originala k netraduka esp-lingva poezio devas kiel eble imiti la italan versfaradon. Oni tamen rajtas timi, ke la aŭtoro estas iom tro inklina preni kiel imitindan modelon la anglan lingvon, kies esencaj ecoj estas ĝuste plej kontraŭaj al tiuj de la itala k de la latinidaj lingvoj. *E. Grosjean-Maupin.*

Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado 1931. 19-a Jaro. Universala Esperanto-Asocio, 1 Tour de l'Ile, Genève, 419 paĝoj. Form. 11 × 15. Prezo: 5 svis. fr. Ricevebla per aliĝo al UEA.

Tiu ĉi, kiel ĉiujare tre ampleksa k zorge kompilita UEA-Jarlibro, kun delegit-adresaro, enciklopedia parto, informoj pri esp-istaj organizoj k gazetaro laŭ la aktuala stato, anoncoj, estas por la neŭtrala esp-isto, kiu deziras praktike apliki la lingvon, tre necesa k utila helpilo. La aranĝo ne diferencas de tiu de la antaŭa jaro; kelkaj artikoloj, kiel tiu pri la Jang (Young)-plano estas novaj. *N. B.*

Arvids Kurmis, La kaŭzo k la devo. Traktaĵoj k rakontoj. Eldonejo „Scienco k Vivo", Riga (poŝtkesto 1444). Prezo: 4 usonaj cendoj. 16 pĝ. Form. 10 × 15.

La student-aŭtoro estas K-do k kunlaboranto al „S-ulo". Pro la specialaj cirkonstancoj en Latvio („S-ulo" tie estas malpermesita) Kurmis volas konigi siajn ideojn per malgrandaj broŝuroj kiel tiu, kiun li prezentas sub supra filozofia titolo. Liaj artikoletoj estas legindaj, verkitaj en proleta spirito; sed preseraroj vere troas en la libreto, ankaŭ bedaŭrindajn gramatikajn erarojn ni devis konstati.

Katalogo de Libroj. Eld. Heroldo de Esperanto, Köln. N-o 8. Nov. 1931. — 32 + XVI pĝ. Form. 10×14. Ĝi entenas sufiĉe ampleksan liston de libroj el la eldonejo aŭ ĉefdeponejo de „Heroldo".

NIA POŜTO

Kjellström (Karlsborg). — via 1.50 kr. sufiĉas nur por 1 anonco. Ĉu vi ne estas informita pri la inflacio en Sv.?

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo":
De Vrije Socialist, Zandvoort, 31. 10, (alvoko por Muni k Bilings), *Socialdemokratas*, Kaunas, n-o 44 (el Italio).

Priesper. artik. k notojn enhavis:
Signalen, Stokh., 19. 11., 26. 11., *L'Effort*, Lyon, 14. 11., 21. 11., *De Syndicalist*, Amsterd., 7. 11., *Dresdner Anzeiger*, 18. 10., *Freiberger Volksztg.*, 12. 11., *Le Semeur*, Lyon, okt., *Der Deutsche Eisenbahner*, Berl., 15. 11., *Le Progrès*, Lyon, 16. 11., *Le Réveil Ouvrier*, Nancy, 25. 11.

Pri SAT enpresis:
New-Yorker Volkszeitg., N. J., 29. 10., granda artik. de K-do Veder.

Peresper. materialon enpresis:
Le Populaire, Paris, 30. 11.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,8 mk g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

FINLANDO

K-do Männikkö Vihtori, Kaivokatu 30; K-do Sulo Kotilainen, Moisiokatu 35, r. I., *Tampere*, kĉl, L, PK.

FRANCIO

Kelkaj kursfinintoj dez. koresp. kun alilandanoj, ĉl, ĉ. temoj. Resp. garant. Skribu al: Kléber Marchand, H.B.M. 1, *Villeneuve-St. Georges (S. et O.).*

GERMANIO

Lab. esp. grupo koresp. individue k kolektive kĉl, L, PI, PK. Resp. garant. Adr.: K. Kämpfe, Louis Wilsdorf Str., 7, *Rabenstein/Sa.*

K-dino Helene Mehl (16 j.), Härtelstr. 9/I. 1., *Leipzig C 1*, koresp. kĉl, PI, fotoj. Nepre resp.

K-do Kurt Richter, Hauptstr. 35, *Heidelberg*, kĉl, pri aktualaj problemoj (ekonomiaj, politikaj, kulturaj).

K-do Willi Böttcher (18 j.), Röntgenstr. 52, *Essen-W.*, pri div. temoj, pref. kun K-dinoj.

HISPANIO

Deziras koresp. kun junaj K-dinoj, pri ĉ. temoj: K-do Urbano Carrasco, 11 calle de Antonio Vicent-Puente de Toledo, *Madrid.*

K-do F. Vila, Passatge de Leon 15, *Barcelona*, serĉas gekoresp-antojn por siaj 35 gelern. en ĉl, pri ĉ. temoj. Resp. gar.

HUNGARIO

Adresŝanĝo. — „Hungaria Esperantista Societo Laborista" k ĝia oficiala gazeto „Antaŭen" sciigas, ke la nova adr. estas jena: *Budapest VII*, Dob-utca 90.

„Hungaria Esperantista Societo Laborista", *Budapest VII.*, Dob-utca 90, fondis lab. esp. gazetservon por la lokaj gazetoj. Ĝi petas la Gek-dojn sendi materialon por ili k same por grup- k murgazetoj. Ĉiun sendaĵon ni rekompencas per sama valoro.

NEDERLANDO

K-do J. M. Daams, Molenweg 230, *Zwolle*, kĉl, pri ĉ. temoj. Unufoja respondo garantiata.

Nova klubo de lab. esp-istoj volonte koresp. kun Gek-doj el ĉl. Skribu al: K-do C. v. Gink, Prins Mauritsstr., 24, *Schiedam.*

Urba oficisto serĉas Gek-dojn el ĉl. por interŝ. L. PI. Resp. garantiata. Adr.: J. Wiersma, Gamminghastraat 32, *Leeuwarden.*

NORVEGIO

K-doj de la grupo „Progreso" koresp. kĉl. Resp. garantiata. Skribu al: K-do Monrad Sundby, Halvdansv. 8 Lille Töien, *Oslo.*

Novfondita klubo en Oslo dez. kolektivkorespondadon kĉl. Skribu al: „La Proleto", Osterhaŭsgt. 9/III. 3, *Oslo.*

SVEDIO

10 K-doj dez. koresp. kun hispanaj, francaj k rusaj Gek-doj. Skribu al: K-do Fritz Bergman, Flodgatan 4, *Malmö.*

Dekjara sveda knabineto dez. koresp. per PI. Adr.: K-dino Sonjo Johansson, Bibergsgatan 1, *Södertelje.*

Esp. rondeto koresp. kun junaj Gek-doj, L, PI. Adr.: K-do Henry Blom, Villagat. 22, *Nynäshamm.*

10 svedaj gefraŭloj dez. koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Adr.: Studcirklo, Box 21, *Iggesund.*

K-do Olof Sandberg, Regeringsg. 4, *Landskrona*, pri ĉ. seriozaj temoj kun 30-aŭ plijaraj SAT-membroj.

SVEDIO

En Laponio pli ol 300 diversaĝaj k diversprofesiaj nov-esp-istoj en tri fer-ercminejaj urbetoj dez. koresp. Speciale atendas respondojn *ĉ. 50 geknaboj (12—14-jaraj).* Ĉar kutime la anoncantoj ricevas el Germanio tro multajn korespondaĵojn, al ni ne estos eble respondi al ĉiuj germanoj, pro kio ni jam antaŭe pardonas antaŭ germanaj Gek-doj. Adr.: Esp. kursoj de N. Ruus, Folkets Hus, *Malmberget.*

GUMO-STAMPILO

kun via tuta adreso kostas *nur* 1.50 mk.g., ronda aŭ ovala 2.— mk. g. inkl. sendkostoj. Ankaŭ grupstampiloj estas haveblaj. K-do Fr. Melchinger, Eybstrasse 72, *Geislingen-Steige* (Germanio), poŝtĉekkonto Stuttgart 387 46. Interŝ. ankaŭ PM ne tro ordinarajn kĉl.

ENHAVO

	paĝo
Kial parolas la homoj?	65—66
Al Zamenhof	65
Kiel senlaboruloj vivas en Aŭstrio	66
Iom da statistiko pri laborista kleriga agado en Svedio	66—67
Alvoko al la SAT-anoj!	67
Ies Opinio	67
La klasbatalo tra la mondo	67—68
Diskutejo	68—69
Kiel mi iĝis anarkisto k SAT-ano	69
Maldeco k klerigo	69
Sennaciula liberpensula paĝo	70—71
Tra Esperantio	71—74

Abontarifo al Sennaciulo: **Argentino, pes. 6; Aŭstrio, ŝil. 12; Belgio, belgoj 12; Brazilio, milrejs. 18; Britio, ŝil. 9; Bulgario, lev. 250; Ĉeĥoslovakio, kr. 60; Danio, kr. 10; Estonio, kr. 8; Finlando, mk. 80; Francio, fr. 40; Germanio, mk. 9; Hungario peng. 10; Italio, lir. 45; Japanio, jen. 5; Jugoslavio, din. 120; Latvio, lat. 10; Litovio, lid 20; Nederlando, guld. 6; Norvegio, kr. 9; Polio, zlot. 15; Portugalio, esk. 40; Rumanio, lej 350; Sovetio, rubl 4,50; Svedio, kr. 9; Svisio, fr. 12; Usono dol. 2,50. — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.** Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon. **MONON ONI SENDU:** rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio).** poŝtĉek-konto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929. — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX. per la poŝtkonto 1234—22. — En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero aŭ per poŝtmandato.**

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)